



Komencanto

Kiel tio komenciĝis

Rakontas Pier-Luigi
Cinquantini, redaktoro de
revuo "L'Esperanto"

Bonvenon al UK-91 en Florenco

Neelpensita historio

El la vivo de esperantisto

Verkoj de niaj legantoj

Eseoj, poemoj,
miniaturaj

Gramatiko serioze kaj ŝerce

Proverboj por komencantoj
Gajaj kantoj pri E-gramatiko

Aforismoj kaj Humuraĵoj

ŝercoj, anekdotoj,
amuza rakonto

Impreso+La praktiko



Impreso pri libro "Vojaĝo en
Esperanto-lando"

Konkurso "Enigmoj-2006"

Korespondul

Dezirantoj korespondi el la
tuta mondo

*Suno kisas galanton,
birdo kantas ĝojkanton...*



la bildo kaj versinioj de Trofimov Aleksej [Omsk, Rusio]

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2006

marto – aprilo

2 (58)

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Carlisle, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorůka 1, CZ-696 62 Strážnice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Emits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Mi-
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Branković
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa
11300, Havana
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugallio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum,
Husarlyckeveggen 29, SE — 24294 Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El
Cerrito, California 94530, U.S.A.

Karaj legantoj!

Tiun ĉi kajeron ni kompilis jam atendante printempon. Tial enhavo de la numero, granda parto de selektitaj por ĝi tekstoj, verkoj kaj bildoj rilatas al printempa temo. Espereble, tralego de la revuo ankaŭ vin agordos printempe, akriĝos la ĝojan percepton de vivo, bonhumorigos vin.

Por la komenco ni invitas vin konatiĝi kun persono tre energia, interesa kaj ideoriĉa. Tio estas aktivulo de itala Esperanto-movado kaj redaktoro de la nacia revuo "L'Esperanto" Pier Luigi Cinquantini. En la rubriko "Kiel tio komenciĝis" li simple kaj alloga rakontas historion de sia esperantistiĝo kaj pri siaj pluaj aktivadoj. Legu ĝin kaj eble poste vi mem agos pli energie kaj aktive.

Versajne vin amuzos reala okazintaĵo el vivo de Eric Walker, nia fidela leganto kaj aŭtoro el Britio. Vi povas ĝin trovi en la rubriko "Neelpensita historio".

Nin ĝojigas abundo de materialoj por la rubriko "Verkoj de niaj legantoj" kaj ni dankas la aŭtorojn pro la senditaj kontribuadoj. Malofte niaj legantoj provas verki en ĝenro de eseo. Bonŝance, ĉi-foje ni povas prezenti eĉ tri eseojn, per kiuj debutas en la revuo Micuko Itabaŝi el Japanio. Allogeco de tiu ĉi eseoj versajne estas en trankvila kaj sincera skribmaniero de la aŭtorino. Krom la eseoj vi trovos en la rubriko agrablajn printempajn miniaturojn, kiujn tradukis kaj sendis al "K" Margarita Kaŝina el Belorusio, poemojn de Boguslav Sobol el Pollando kaj Viktor Ĉaldajev el Rusio. Ĉiuj tiuj verkoj estas penetritaj per ĝoja printempa humoro.

Pli ol ĉiam estas amuzaj la gramatikaj paĝoj, kie vi ne nur analizos Zamenhofajn proverbojn sub gvido de Johan-Luko Tortel el Francio, sed povos eĉ kanti ĉi-foje, sed pri nia lingvo kaj E-gramatiko. Tion ebligas gajaj kantoj de E-poeto Baldur Ragnarsson el Islando.

Riĉa kolekto de diversspecaj humuraĵoj, kiujn kontribuis Ginette Martin el Francio, Tatjana Aŭderskaja el Ukrainio kaj Aleksandr Ŝilov el Rusio — ankaŭ portas grandan dozon de bonhumoro.

Nepre leginda estas "impreso" de Catherine Boen el Francio, ĝi enhavas multajn utilajn konsilojn. Najbare al ĝi vi trovos ankoraŭ unu kanton. Tiu ĉi estas el la populara libro de B.Kolker "Vojaĝo en Esperanto-Lando".

Dezirante agrablan legadon kaj printempan inspiron,

la Red.

Komencanto

2006 numero 2 // (58) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

kunredaktas Raja Kudrjavceva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2006:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 12 eŭroj;

konto ĉe UEA: [vkud-a](#)


rusia tarifo: 180 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Redaktoro de la oficiala organo de Itala Esperanto-Federacio "L' Esperanto"; vaste konata aktivulo de itala E-movado, eks-estrarano de Itala Esperanto-Junularo kaj unu el la ĉeforganizantoj de 53-a IJK en Assisi, (Italio, 1997); nuna membro de la Nacia Konsilio de Itala E-Federacio, produktinto kaj rolinto de la unua muzikalo en Esperanto "Venu rapide homoj".

...la vilaĝo malkovris ke Esperanto estas pli ol stranga hobbio de "strangulo" - ĝi funkcias.



U nue, mi komencu dirante, ke efektive mi ne bone memoras, kiam mi komencis studi Esperanton. Mi loĝas en eta vilaĝo centre de Italio kaj kulturon tiutempe, se vi mem ne serĉis, ne eblis akiri per aliaj manieroj (Interreto, televido). Universitatoj estis en la ĉefurbo (tiuepoke tiom malproksima... 80 km) aŭ en aliaj urboj pli malproksimaj, kiel ekzemple Pizo. Do, ĝuste en ĉi lasta urbo mia pli aĝa frato (9 jarojn pli) decidis frekventi universitaton kaj tie, danke al klubo, konatiĝis kun Esperanto. Do, laŭ mia memoro, de kiam mi estis almenaŭ dek-unujara, mi aŭdis paroli pri Esperanto kaj foliumis revuojn kiel "El Popola Ĉinio" (kiu por mi tiam signifis "La Ĉina Popolo"). Tamen mi ankoraŭ ne sentis la emon studi ĝin. Ĝis unu el la diversaj kvereloj inter mia frato kaj mia patrino. Mia patrino estas tre pragmata virino kaj ne povis/as kompreni, ke krom vilaĝo kaj kultivata kamparo povas ekzisti aliaj stimuloj, kiel emo ekkoni aliajn kulturojn

vojaĝado, ekono de aliaj homoj (kial ne devus sufiĉi la 3000 el nia vilaĝo?). Vi povas imagi, krome, ke por pragmatulino "stranga lingvo" parolata en neniun lando estas vere senutila. Nu, dum tiu "kverelo" mia frato klarigis la filozofion de Esperanto kaj, tre strange, mia patrino komprenis, kaj tiam eĉ proponis al mi studi ĝin. Mi eĉ ne scias, ĉu pro tiu instigo, aŭ ne, mi komencis studi ĝin, sed se mia patrino rememorus tiun proponon nun, eble ŝi preferus morti...

Do mi prenis la manlibron de mia frato kaj komencis ĝin studi. Ĉu tiel simple? Ne... estus tro bele. Kiel diris mia patrino, mi estis tre enuigema, mi komencis multajn aferojn sed ne daŭrigis ilin (verdire ankoraŭ nuntempe...). Do mi komencis studi sed meze de la manlibro mi ĉesis. Post iom da tempo mi rekomencis, kaj re-ĉesis. Tiel por tri kvar fojoj, ĝis iam, kiam mi decidis fini la lastajn lecionojn unuglute kaj komenci praktiki kaj plu lerni ĝin legante revuojn kaj librojn. Nuntempe mi povas ankoraŭ

rememori la odoron de la manlibro, kaj kiam mi reflaras ĝin mi rememoras pri tiu epoko.

Do tiel mi eniris en la kulturon de la lingvo. Mi komencis legi librojn kaj revuojn. Bonŝance mia frato jam posedis, alie mi tiam certe ne havus monon por aĉeti aŭ aboni ilin. Pri peto de mono por tio al miaj gepatroj, ni ne parolu... Tamen dum liceaj jaroj mi povis komenci ŝpari la monon de la matenmanĝo – rezignante pri ili – kaj krei mian bibliotekon.

Tamen dum la sekvintaj jaroj mi neniam partoprenis en kunvenoj. Krom legi, mi komencis korespondi. Tio ankaŭ pro tio ke mi ne konis samideanojn kaj mi preskaŭ timis viziti renkontiĝojn kie mi konis neniun. Do mi restis ekster la kutimaj kunvenoj. Dume mia frato transloĝiĝis pro laboro al Nederlando kaj poste al Germanio kaj mi profitis la okazon viziti lin kaj tieajn klubejojn, kaj proksime de la jubilea jaro mi decidis ke la tempo estis matura por la "ekflugo". Mi aliĝis al IS (*Internacia Semajnfino-la red.*) en Germanio kaj, la postan jaron, al IJK kaj UK en Pollando. Iom poste mi komencis frekventi la IJF-ojn (Internacia Junulara Festivalo) en Italio kaj aliajn internaciajn kunvenojn. Tiel komenciĝis la pilgrimado tra Esperantolando. Dum mia vizito al IJF mi decidis engaĝiĝi en la Itala Junularo kaj iom poste mi havis ideon por ŝpari al mi la vojaĝojn eksterlanden, organizante aranĝon ĉe mi. Mia vilaĝo, kvankam malgranda, estas tre histori plena kaj posedas atestaĵojn de civilizacio dumiljaraĝa, la etruska. Mia ideo estis malkovri kaj purigi parton de la granda etruska nekropolo pere de esperantistoj, tiel danke al kunlaboro de la urba registaro mi ekorganizis laborbrigadon kun la partopreno de averaĝe po 40 homoj jare (ĝi daŭris 5 jarojn). >>>

Dum mateno oni laboris kaj dum posttagmezo oni ekskursis tra la ĉirkaŭaĵoj de la vilaĝo kaj al la diversaj urboj de la regiono. Dum nokto la amuziĝoj plu daŭris per muzikumado aŭ naĝado en varmbasenoj, aŭ manĝado de pico.

Dum mia, ne longa, partopreno en la estraro de IEJ, mi komencis pledi por la organizo de IJK en Italio (jam pasis preskaŭ 40 jaroj de la unua kaj lasta, kaj jam tempis organizi duan). La kolegoj lasis min fari, kondiĉe ke mi okupiĝu pri la serĉado de la loko, eble pensante ke ne eblos ĝin trovi. Male la komisio sukcesis kaj tiel en 1997 okazis la IJK de Assisi, kiun mi kunorganizis. Tiuepoke mi membris en la teatra trupo de mia vilaĝo kaj nia unua muzikalo estis "Venu Rapide Homoj" (en la itala, kompreneble). Do mi pensis ke la okazo estis ne maltrafinda: prezenti ĝin en la urbo de ĝia ĉefrolulo: Sankta Francisko. La epoko estis matura por ke la trupo jesu al tiu propono: jam okazis la laborbrigadoj kaj la vilaĝo malkovris ke Esperanto estas pli ol stranga hobia de "strangulo": ĝi funkcias. Do mi organizis kelkajn kursojn tre sukcesajn kaj la plejparto el la trupo frekventis ĝin, eble ne ĝis fino sed almenaŭ por kompreni pri kio temis. Kaj jen kiel nia aventuro komenciĝis en tiu IJK, plu daŭris dum Nacia Kongreso, kaj ripoziĝis dum la venonta UK en Florenco. Ĉio ankaŭ danke al la kantradukoj de Giuseppe Castelli.

Do, la organizo de la IJK estis la inda fino de mia kariero en la itala junularo. De tiam mi povis daŭrigi frekventi la diversajn kunvenojn tra Eŭropo, libera je engaĝiĝoj en la aktiva Movado. Tio tamen ne daŭris tre longe ĉar iam mi decidis transpreni la redaktadon de nia nacia revuo, "L'esperanto", okaze de la forlaso de la tiama redaktoro, kaj, nuntempe, jen mi ĉiunmonate maltrankvila pro ĝia kompostado.

Dume mia aktivado daŭras per vojaĝoj tra Eŭropo. Miaj lastaj tri estis al Rusio: al la IJK en Kovrov, al la Lingva Festivalo de Ĉeboksari, kaj, dum la sekva printempo, kroman fojon tie: unu monaton por instrui Esperanton al ĉeboksaranoj. Jen ĉio.

Ha, eble vi scivolas pri tio, kion faras mia frato nun?

Nu, li parolas ok lingvojn kaj, kiel multaj movadanoj, pro familio kaj laboro ne restis aktiva en la movado, kvankam li povas daŭre paroli Esperanton kaj kelkfoje utiligas ĝin en siaj vojaĝoj.

Pier Luigi Cinquantini

91-a Universala Kongreso de Esperanto

Florenco, Italio



Bonvenon al Florenco 2006

Italaj esperantistoj bonvenigas vin al la 91-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Florenco de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2006.

Ĉiuj detaloj troviĝas ĉe la <http://uea.org>

Partoprenantoj de la UK-91 povos ĝui ĉi-jaran kongresurban Florencon, kiu estas certe unika urbo kaj por ĉiam restas kiel impresiga monumento de unu de la plej grandegaj ekflugoj de homa genio en la monda historio.

Florenco estas ĉefurbo de regiono Toskanio, ĝi situas sur la bordo de rivero Arno kaj estas urbo kun pli ol duonmiliono loĝantaro. Ŝajnas, ke nenio hazarda estas en la historio de tiu ĉi urbo. Diidon de floroj kiel protektantino de la urbo elektis ĝiaj loĝantoj kaj nomis la urbon "Florentia", kio signifas "la floranta, la prospera" kaj en la historio de la urbo poste okazos periodo, inter la fino de la 14-a jc kaj la dua duono de la 16-a jc, kiam vere ĉi tie disfloris scienco kaj artoj kaj Florenco iĝis lulilo de Renesanco. Estas neeble listigi ĉiujn eminentulojn, kiuj naskiĝis, vivis kaj laboris ĉi tie kaj nur kelkajn nomojn inter la plej elstaraj ni memorigas al vi: Dante Alighjeri (1265-1321) - poeto, verkinto de "Dia Komedio"; Franĉesko Petrarca (1304-1374) - fama poeto; Leonardo da Vinci (1452-1519) - pentristo kaj scienculo; Filippo Brunelleschi (1377-1446) - arkitekto, Michelangelo Buonarroti (1475-1564) - skulptisto kaj arkitekto; Galileo Galilei (1564-1642) - sciencisto-fizikisto; Pikkolo da Mirando - filozofo, lingvisto, kiu sciis 27 lingvojn kaj multaj aliaj gigantoj de la arto kaj scienco. Veninte Florencon, vi havos eblon konatiĝi kun arkitekturaĵoj, skulptaĵoj, pentraĵoj kaj aliaj valoraj atestaĵoj de kreiva laboro de tiuj geniuloj, konatiĝos kun urbo fama pri sia kulturo kaj pri la monumentoj, kiuj beligas la urbon, povos konstati, ke postsignoj de antikvaj civilizacioj, spuroj de pasinteco ĉie ĉeestas ĉi tie, ekde historia centro de la urbo kaj en la tuta toskania regiono.

Aldone al arto kaj historio, allogas belegaj naturaj vidindaĵoj, Toskanio proponas mirindajn naturajn lokojn, kiuj vere estas vizitindaj.

Florenco famas ankaŭ pro diversaj siaj meti-artoj: prilaboro de oraj kaj arĝentaj juveloj, ŝtonaj mozaikoj, ceramiko, brodado ktp.

Krom ĉio nepre menciinda estas la fakto, ke la Itala Esperanto-Federacio estis fondita en tiu ĉi urbo en 1910.

Do, ne preterlasu la ŝancon viziti mirindan historiplenon Florencon kaj partopreni la plej allogan Esperanto-aranĝon de la jaro!

Eric Walker [Ipswich, Britio]

El la vivo de esperantisto



Trofimov Aleksej [Omsk, Rusio]

Antaŭ multaj jaroj, kiam ankoraŭ ekzistis la "malvarma milito" kaj la komunisma sistemo ankoraŭ regis en Soveta Unio, mi partoprenis en ege agrabla feriado en malgranda urbo Voljskij apud Volgogrado, kiu antaŭe havis la nomon Stalingrad, kaj kie okazis la plej granda batalo de la dua monda milito.

Ĉe la fino de la feriado, nia grupo iris al la trajna stacidomo por reveni al Moskvo. Estis eble dudek minutoj antaŭ la foriro de la trajno, kiam mi eniris la dormvagonon. Mi montris mian bileton al la frostvizaĝa dika servistino kaj ŝi kondukis min al mia kupeo.

Mi lasis miajn pakojn sur mia lito kaj eliris por adiaŭi miajn novajn kaj antaŭekonatajn geamikojn. Ni staris sur la kajo kaj ŝercis, babiladis kaj kantis.

Subite unu el miaj amikoj diris: "Erik! la vagonestrino parolas kun du policianoj kaj fingromontras vin!" Kaj la du policianaj venis al mi kaj petis mian pasporton kaj vizon. Feliĉe ĉio estis en ordo.

Finfine ni eniris en la trajnon kaj komenciĝis la 24-hora vojaĝo al Moskvo. Mi sidis en la kupeo kun Zhu Bin, ĉina kuracisto, kiu praktikadis en Moskvo.

Post horo, venis la ĉefkonduktoro de la trajno, agrabla ne juna viro, kiu petis min veni al la kupeo de la servistino. "Estas maigranda problemo kun via bileto" - li diris. Mi iris kun Zhu Bin, kiun petis traduki por mi. Ni venis en kupeon de la vagonestrino, - ŝi sidis kun falditaj brakoj, kun severa esprimo sur la vizaĝo (la nomo "servistino" estis tute ridinda afero, ĉar tiu tipo de homoj ne "servas", ŝi estas reĝino kaj la klientoj estas nur la kanajloj!).


La konduktoro klarigis, ke kiam mi montris mian bileton al la servistino kaj ŝi kontrolis mian pasporton, iĝis klare, ke mi estas "okcidentano". Tamen mia bileto estis tipa bileto por sovetianoj. Okcidentanoj devas havi bileton, kiu kostas dekoble! Krome, okcidentanoj devas veturi en speciale rezervata kupeo!

Sed, la ĝentila konduktoro diris: "Ne estu maltrankvila, la tuta afero estas stultaĵo kaj vi povas resti kun via amiko, sed mi devas enskribi vian nomon kaj pasportnumeron en mian ofican libron". Dume la virino daŭre sidis kun malamika mieno, eble ŝi pensis, ke mi estas riĉa malbona kapitalisto, pri kiu ŝi ofte legis en "Pravda" kaj mi celas ekspuati la landon de socialismo.

Do, ni finis. Kiam ni ekstaris por eliri, mi petis al Zhu Bin informi ilin, ke antaŭe mi mem estis laboristo en la brita fervoja sistemo. Kiam la virino aŭdis ĉi tiujn vortojn, ŝia mieno tute ŝanĝiĝis!. Kun rideto ŝi diris: "Ne foriru! Sidu kaj ni trinku hejmfaritan brandon". Do ni denove eksidis, kune trinkis kaj babiladis iomete, kaj poste revenis al nia kupeo.

Vespere la vagonestrino denove venis al nia kupeo kun brando kaj glasoj kaj alportis por mi teleron kun viando kaj pano. La rusaj homoj en la kupeo rigardis kun vaste malfermitaj okuloj. Eble ili miris - kiu estas ĉi tiu eksterlandano, por kiu la "reĝino" de la vagono alportas nutraĵojn? Eble la nevo de *Winston Churchill*?

Do, tiu ĉi historio estas bona ekzemplo de tio, kiel povas ege ŝanĝiĝi etoso, kiam ekzistas io por ligi homojn!



Bill Thorne

[Londono, Britio] bildo el arkivo de "Komencanto"

Tiu ĉi du eseoj, originale verkitaj de nia legantino el Japanio s-ino Micuko Itabaŝi estas ŝia debuto sur paĝoj de nia revuo. Ambaŭ eseoj rakontas pri elstara esperanto-verkisto el Japanio Ito Saburo, kies poemoj estis unue kolektitaj en vaste konata poemaro "Verda Parnaso" kaj al la 60-jara jubileo de la poeto liaj disĉiploj kompilis ilin sub la titolo "Poemoj de I.U."

Infana koro kaj poeto

eseo de **Micuko Itabaŝi**
[Jokohamo, Japanio]

HOMA RANO estas poemo de ITO Saburo. Ĝi eniris en la poemaron VERDA PARNASO, kiu estis eldonita en 1932. Pri la poemaro mi aŭdis de ITO kaj kelkfoje de aliaj.

Antaŭ 7 jaroj gefiloj de malnova esperantisto ADAĈI Ĉjotaro proponis al mi, ke mi disponu tutan lian Esperantan libron. Inter libroj mi ekvidis la poemaron "VERDA PARNASO", kiun mi konservis por mi mem.

En la poemaro mi trovis gajan vortulodon kaj legis ĝin kun rideto, rememorante Ito Saburo: en mia memoro li ĉiam havis infanan koron.

Niaj kamaradoj foje kunvenis por presi afiŝon por Esperanto-propagando. La loko estis iu universitato, kiu havis rajdejon kun stalo. Post la laboro ni promenis en vasta korto. La plej gaja estis ITO. Li parolis pri Esperanto, pri poemoj, pri socialaj problemoj tiel, kvazaŭ birdetoj pepas.

Ankaŭ kiam ni estis en fama granda ĝardeno Ŝinzjukugjoen, li demetis ŝuojn kaj promenis sur gazono. Neniu estis ĉirukaŭ ni, ĉar unu el niaj kamaradoj laboris en la ĝardeno kaj invitis nin dum la tago, kiam ĝi estis fermita.


Kiam iu diris al ITO, ke verki poemon en Esperanto estas malfacile, li respondis, ke tio estas tre facila afero. Li diris, ke plenkreskuloj havas kutimon kaŝi sian koron. Unue oni demetu sian veston de la koro, liberigu sian animon de onidiro kaj rehavu infanan koron - post tio ĉiu povos verki poemon. Plej malfacile estas havi nudan koron.

Mi volas prezenti al vi lian poemon HOMA RANO kaj petas, ke vi legu ĝin, kvazaŭ infano legus bildlibron.

Kaj poste vi amare ridetos !

HOMA RANO

Ito Saburo



Bildo de Izmaĵiova Luiza [Kuzneck, Rusio]

Foje vivis ulo saĝa,
Nur, li estis malkuraĝa.
Li ne havis propran neston,
Havis sole verdan veston.

Iam dormas li en lago,
Kaj sur arb' en iu tago,
Tiel ke la verdfolio
Lin defendu kontaraŭ ĉio.

Kiam li en akvo ludas,
Al la fiŝoj li aludas,
Ke li volas lage resti,
Kaj amiko fiŝa esti.

Sed li sur la tero diras,
Ke li kore tre deziras
Esti bona kamarado
En la besta kunvivado.
Certe lia lango havas
Sorĉon, kiu ĉiun ravas.

Jen, li kantas kaj babilas;
Birdon, beston ĝi similas.

Ankaŭ havas li talenton
Teni, kiel fiŝ', silenton.

Malfacile ni divenas ;
Kiun tiu apartenas,
Ĉu al akvo, ĉu al tero.
Kaj li kvakas kun fiero :
„ Mi neniam ja malamas,
Nur la AM' en koro flamas! ”

Tiel, pace, tag' post tago
Pasis ĉe l' arbar' kaj lago.

Sed subite kuris famo,
Ke terura la malamo
Inter akvo kaj la tero
Kreskis ĝis la ekkolero.

Baldaŭ estos la batalo,
Neevitebla de l' fatalo.

Ĉu vi povas nun imagi'
Kiel devis l' ulo agi?
Pro ekstrema granda timo
Konsterniĝis la animo.
Li, perdinte la konscion,
Kuris for lasinte ĉion.

En arbaron li alvenis,
Kaj sin kaŝi li tre penis.

Trovis tie li feliĉe
Foliaron verdan riĉe.

Al li venis en memoro,
Ke lin gardas verdkoloro.
Kaj li tien nun rapidas,
Post la folieto sidas.
Tiam frapis fulma helo,
Kaj ektondris sur ĉielo.
Ĝi ja estas la signalo
De la Akvo-Ter' Batalo

Kiu venkos, ĉu vi scias ?
Kiel vi ĝin opinias ?

Akvo estis tre humila,
Ĝis nun ĉiam tre trankvila.
Sed ĝin Tero tro ofendis,
Longe Akvo vane plendis.

Servis ĝi sen rekompenco.
Tenis ĝi kun pacienco
Ĉion pezan, malagrablan,
Kaj maldolĉan, malafablan.

Laboradis ĝi sindone
Kaj vivigis ĉion bone.

Ĉu sen akvo, kverkoj grandaj
Starus tiel elegantaj ?
Kaj sur kampoj grenaj plantoj
Donus ĝojon al plugantoj ?

Ne, neblas, ja memklare,
Ĝi meritas senkompare.

Por tritikoj, por la pinoj,
Por la lupoj, kaj kokinoj,
Akvo nepre ja necesas
Kvankam oni ĝin forgesas.

Sen ĝi ĉiu mortsoifas,
Dank' al ĝi nur ĉiu vivas.

Sed la Tero ĝin ne dankas,
Gentilec' al ĝi nun mankas,
Nur sendante en la maron
Kotan polvon, grandan aron.

Akvo nun ekfuriozis
Kiel oni ne supozis.
Svarmas, kuras, flugas nubo,
Hurlas, siblas, batas pluvo.
Lukte levas sin la ondoj,
Por ke renversiĝu mondo!

Montoj kaŭras nur senmove,
Kampoj kuŝas tutsenpove.
Ĝenas, ploras la arbaro,
Kaj sin ĵetas granda maro.

Maro estas ja pli granda,
Ol la tuta parto landa.

Nun forkuras tigroj, lupoj.
Antaŭ ŝarkaj, drakaj trupoj.

Fortimiĝas eĉ leonoj
Antaŭ la batalionoj
De la viglaj jundelfenoj,
Kaj de l' monstraj grand-
balenoj.

Forfluganta aglo palas,
Kaj surteren svene falas!



Tiel jam neniu tera
Kontraŭstaras al supera
Forto de la Akvo Giganto.
Sonas nun triumfa kanto:

„Mondo estas purigita
De la granda ban'milita,
De la lav' revolucia ;
Malaperas la socia

Malbonaj' de niaj manoj
Manoj de l' samideanoj.
Kreu nun la novsocion,
Faru bona, bela ĉion!
Vivu, novaj homaranoj!”

Kaj aperis jen subite
La ridinda verd-vestito,
Floŝe sur la folieto.
Kaj ekridis li kun peto:

„Bonan tagon, he sinjoroj,
Min akceptu kun favoroj,
Al la gaja via rondo
Al la nova ĝoja mondo.
Se vi estas homaranoj,
Mi ja ankaŭ Homa Rano!”

Je ĉi tio granda rido
Tuj eksplodis tra l' kunsido.

Ridis ŝarkoj kaj delfenoj,
Kaj plej laŭte la balenoj.

Tiel vigle rido blovis,
Ke ja tiam oni trovis
Lin flugantan en aeron.
Kaj nun falis li surteren!

Sube estas krokodilo,
Ha, ridanta en trankvilo.

Se ne estus li manĝita
Krevus li sur la granito.

Vivu, vivu, ho, maranoj!
Vivu novaj homaranoj!
Sed ja mortu homaj ranoj!



Por kiu I.U. kantis lulkantojn?

eseo de Micuko Itabaŝi [Jokohamo, Japanio]

Dum transskribo de poemaro Idilio, verkita de ITO Saburo, mi rememoris la tempon de 1960-aj jaroj, kiam mi lernis Esperanton. Tiutempe Japanio estis survoje al ekonomia progreso. Iuj profitis kaj multaj konkurante celis sian profiton. Kaj ankoraŭ estis malriĉaj homoj, kiuj estis kvazaŭ lasitaj ekster la progresema socio.

Tiam mi estis studentino kaj studis Social-Bonon. Meze de Tokio ekzistis iamaj kazernoj, kie loĝis tiuj malriĉaj homoj, lasitaj de la socio. Oni organizis tie Socialan Interhelpon. Mi partoprenis en ĝi. Multaj loĝantoj ne estis edukitaj. Pro tio ili havis tre simplan laboron kaj foje perdis eĉ tion. Iliaj gefiloj ne havis intereson pri lernado, kaj ili foje okazigis konfliktojn en siaj klasoj. Ni, studentoj, frekventis la kazernojn por helpi la loĝantojn kaj iliajn gefilojn. Ilia situacio memorigis al mi la socion en la periodo tuj post la dua mondmilito. Mi mem estis malriĉa studentino, sed ili estis tre malriĉaj. Pli kaj pli dubo penetris en min, - kion ni, junuloj, povas fari? Mi vidis nin senpovaj. Mi dubis, ĉu idealo pri sociala bono estas realigebla. Tiam mi renkontiĝis kun esperanta gvidanto ITO Saburo.

Li ankaŭ estis malriĉa. Malgraŭ tio li ĉiam havis esperon pri estonceco. Li diris al mi: “Nian socion faras ni mem. Ĉiujn sistemojn, morojn, ĉiujn kulturojn en la mondo, eĉ lingvojn faris homoj. Miaj avo kaj patro elpensis multajn aferojn. Certe vi scias pri konsilantara sistemo pri publika bono. Mia avo elpensis ĝin en Meizi-epoko kaj ĝi poste fariĝis ŝtata organizo. Kiam mi estis knabo, mi deziris elpensi ion por plibonigi la socion, ĉar nur ordinaraj homoj povas ŝanĝi la socion kaj fari ĝin bona. Vi devas daŭrigi la taskon! Ni devas plibonigi nian vivon, por tio ni devas labori. Vi bone studu kaj laboru por tio.”

Tiutempe li gvidis Esperantan klubon de laborista lernejo. Vespere mi iris al stacidomo Tamaĉi per trajno kaj de tie pli ol dudek minutojn piede mi iris al la E-kurso. Preskaŭ ĉiufoje mi renkontis Ito en la stacidomo. Survoje al la lernejo li rakontis al mi pri Esperanto, ekzemple: kio estas Esperanto, kion deziris Zamenhof ktp. Mi volis lerni la lingvon kaj estis malkontenta. Sed li diris al mi, ke la lingvon mi povas lerni mem poste, kiam mi havos tempon. Nun mi komprenas, ke li elektis tiun tempon por gvidi min en Esperanton.

Por transskribi la poemojn de Ito, mi ripete legis ilin kaj forte eksentis liajn ĝojojn kaj malĝojojn. Precipe legante lulkantojn, mi sentis lian suferon kaj nedeziron perdi esperon. Kiam li verkis ilin? Ĉu li diris al mi, ke unu el liaj filinoj estas samaĝa kun mi. Ĉu li verkis la poemojn, kiam la filinoj estis infanoj? Mi pensas, ke la tempo estis antaŭ kaj dum la dua mondmilito. Tiam li estis ofte arestita kaj pasigis tri jarojn kaj 8 monatojn en malliberejo. En la poemoj mi vidas figuron de tute laca lia edzino kaj mi supozas, ke li senkonsole kantis siajn lulkantojn al la edzino. Sed tio estas nur mia imagado.

Mi nun nur rememoras lian mildan rideton kun plena espero.

Ĉi tie vi povas legi diversĝenrajn originalajn kaj tradukitajn verkojn de niaj novaj kaj malnovaj aŭtoroj el diversaj landoj. Ni kolektis ilin sub unu temo, kiun nomis "Atendante printempon..."

Jam estas printempo

Micuko Itabaŝi
[Jokohamo, Japanio]

Morgaŭ estos la unua tago de printempo laŭ kalendaro. Hieraŭ mi promenis sur pado apud rivereto, kiu fluas proksime de mia domo.

Kiam mi estis tie en la lasta semajno, ankoraŭ kuŝis neĝo. Pro malvarma temperaturo ĝi ne degelis kaj tavalis dum pli ol dek tagoj. En mia urbo Jokohamo malofte neĝas. Kaj tial infanoj tre ĝojis pri la neĝo kaj faris neĝulojn antaŭ siaj domoj. Ili longe staris tie kaj ĉi tie.

Estas sufiĉe vasta parko proksime de la rivereto. Ĝi havas deklivon norde. Geknaboj alportis grandan kartonan skatolon, sidiĝis en ĝin kaj glitis sur la deklivo kun ĝojkrioj.

Hieraŭ vento estis milda. Gaje pepis birdoj. Kion serĉis mevoj? Ili flugis malalte en la aero. Ĉi foje mi ne vidis geknabojn, sed renkontis paŝantojn, multaj el ili promenis kun siaj hundoj.

Mi trovis etajn ruĝajn burĝonojn de umeoj*. La dimensioj estas ankoraŭ kelkmilmetraj, sed baldaŭ ili ekfloros.

* Umeo – japana kreskaĵo.


K. Uŝinskij. Esperantigis
Margarita Kaŝina [Vitebsk, Belorusio]

Vento kaj Suno

Foje la Suno kaj la malica norda Vento komencis diskuti, kiu el ili estas pli forta. Longe ili diskutis, kaj fine decidis ekprovi siajn potencojn al la vojaĝanto, kiu dum tiu sama tempo rajdis sur ĉevalo laŭ vojo.

— Rigardu, - diris la Vento, - kiel mi atakos lin kaj forblovos de li mantelon. Kaj la Vento komencis blovegi al la vojaĝanto.

Sed ju pli forte blovis la Vento, des pli la vojaĝanto tiris al si la mantelon: li grumblis kontraŭ malbona vetero, sed plu veturis laŭ sia vojo. La Vento iĝis pli kaj pli malica, ŝutis al la kompatinda vojaĝanto pluvon kaj neĝon. Malbenante la Venton la vojaĝanto eĉ pli forte volvis sin en la mantelon kaj aligis ĝin per rimeno. Kaj la Vento konvinkiĝis, ke ne povos li fortiri la mantelon de la vojaĝanto.



— Jen, vidu, - diris tiam la delikata Suno al la malica Vento, - per kareso kaj varmo oni povas atingi pli multon, ol per malico.

* * *

Boguslav Sobol [Varsovio, Pollando]


* * *

Vento spiron haltigis
sur la arbon eksidis
silitiĝis folioj.

Palpebrumis la suno
ridetantaj radioj
tre ĝojigis la florojn.

Birdo ĉielon rigardis
La flugilojn etendis
super tero ekpendis.

Atendante



La Suno, vidante senrezultajn provojn de sia rivalo, ekridetis, eliris el post la nuboj, ekbrilis, varmigi kaj sekigis la teron kaj la kompatindan frostigitan vojaĝanton. Eksentinte la varmon de sunaj radioj, li ekĝojis kaj mem formetis la mantelon de si.

Vekiĝis tago...

Vekiĝis tago,
ĉielo frovas okulojn,
sangan nuboj.

Suno malkuraĝe
tra la fendoj rigardas
per la fasko de radioj.

Suspiras arboj,
kliniĝas kronoj,
kortuŝiĝas floroj.

printempon...

Esperantigis Margarita Kašina [Vitebsk, Belorusio]

La suna guteto

— Don!... Dinj!... Denj!...

De la tegmentoj, de diafanaj glacipendaĵoj falas suben gutoj. Ili brilas en la sunaj radioj, rebrilas per ruĝaj, bluaj, flavaj fajreroj.

Ŝajnas, ke gutas ne malvarma akvo, sed flugas varmegaj sunaj ŝprucoj.

Paseroj naĝis en tiuj akvaj ŝprucoj kaj ekpepis, ekĉirpis printempe-ĝoje.

La blanka koko satrinkis el la suna flaketo – svingis per la kresto, ekklakis per la flugiloj kvazaŭ arbara aŭdaculo tetro.

Mi elkuris el la hejmo kaj guto trafis al mia vizaĝo.

Mi volis viŝi la okulojn - kaj subite stumblis.

Por iu momento, dume mi rigardis tra la guto, ĉio ŝanĝiĝis ĉirkaŭe: ekbrilis, ekradiis, ekstremis per buntaj fajreroj...

Kaj la ĉielon, kaj la teron, kaj neĝajn kampojn - la tutan mondon prilumis kaj briligis malgranda suna guteto.

Viktor Ĉaldajev [Barnaulo, Rusio]

Martdimanĉe


Jen citrono. Jen mielo.
Kaj apude – l' ora ŝelo.
Sukersablo – en la vaz'.

Mart'. Dimanĉo.
Trink' post manĝo.
Bonas teo kaj vetero –
kaj la kora, kaj la tera
ĉar la vintro ne eternas,
ĉar degelas neg' ekstere,
kaj promeni emas mi
de la marto ĝis juni'.

Hej, saluton, la birdetoj,
hominetoj kaj hometoj!
Estu ĉiuj ni poetoj
ĉe l' rojetoj fluimpetaj!

Tag' – libera. Jen afero:
iras, spiras mi l' aeron
dum la tago, kaj vespere
trafas en "Oazon"* mi.
"Hej, la verdaj, vivu nil

* "Oazo" – nomo de Esperanto-klubo en u. Barnaul.



bildoj de Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]



Karaj legantoj!


Vi denove estas invitataj al amuza leciono pri Esperanto-gramatiko, kiun gvidas en karaktera por li leĝera kaj sprita maniero jam konata al vi Johan'-Luko Tortel el Francio.

La leciono samtempe helpos por pli bona kono de famaj Zamenhofaj proverboj.

Johan'-Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

Proverboj por komencantoj

Saluton, geamikoj! Ni hodiaŭ amuziĝu per falsa frazo. Falsa, ĉu? Jes, neĝusta, intence erare skrib-ita proverbo!



Jen:

* Ŝafo gard-ata eĉ lupo timas

(la "steleto" indikas eraran frazon).

Ĉu ni trovas la eraron? Ni serĉu, ni serĉu!

Nu, kiu timas la alian? Ĉu la ŝafo timas la lupon, kiel kutime, aŭ ĉu eble la lupu timas la ŝafon? Ni ne povas diri! Mankas la indik-ilo -N aŭ la prepozicio antaŭ la komplemento.

La vera proverbo estas:

ŜafoN gardataN eĉ lupu timas

(646)

Lupu timas ataki ŝafon, se gard-anta homo aŭ hundo ĉe-estas.

Jen bela ekzemplo de la neceso de malsama vesto inter subjekto kaj komplemento, pri kiu ni babilis en la lasta "Komencanto".

Diferenc-igi subjekton de komplemento ankaŭ ebl-igas trankvile komenci per la komplemento, se oni volas insisti al ĝi. "Al panjo ridetas bebo" klare signifas, ke bebo agas, kaj trafas panjon. Neniu riproĉas al kelkaj naciaj lingvoj, ke ili ne kapablas esprimi tion, sen la peza diro: "Estas al panjo, ke ridetas bebo". Sed Zamenhof tuj sentis, ke li ne povas permesi al si tian mallert-aĵon, kaj ke oni ne toleros la plej etan mal-forton de lia lingvo, dum oni respektu klin-iĝos antaŭ iu ajn absurd-aĵo de iu ajn etna idiomo.

La steleto de la erara frazo nom-iĝas *asterisko*. Asterisko? Grek-devena vorto, kiu signifas: steleto! Oni uzas ĝin en presejoj, en libroj, ktp. Nu, kial Grek-de-ven-a vorto? La tial-o simplas: la antikvaj Grekoj frue interesiĝis pri la ĝusta uz-ado de sia lingvo. La unuan kompletan gramatikon verkis Dionizio de Trakio (Saluton, spirito de Dionizio!) ĉe la dua jarcento antaŭ la nuna erao.

Ni ankaŭ renkontis plurajn latinajn de-venojn, en nia lasta babilado. La Romianoj verkis gramatikojn por sia latino, plej ofte el-greke tradukante, aŭ eĉ nur kopiante la samajn vortojn. La Roma Aelio Donato verkis la plej konatan en la kvara jarcento de nia erao, do ses jarcentoj post Dionizio. Bonvenon en "Komencanto"-n, spirito de Aelio!

Poste la Eŭropaj lingvoj kopiis la latinan, kaj Esperanto la Eŭropajn:

Malnova afero en nova livero

(1448)

Steleto, aŭ asterisko, ĉu? Ĉiu-foje kiam ni povas, ni uzu simplan esperanto-vorton; nur kiam ni vere bezonas teknikan, ni esperant-igu jam internacie konatan, laŭ la 15-a regulo de la gramatiko de nia Fundamento.

Sed kio do estas tiu (aŭ la!) Fundamento? Ĝi estas la dua geni-aĵo (el tri) de nia Zamenhof! Ni babilu pri ĝi venontan fojon.

Ĝis!

Ĉi tiujn gajajn kantojn pri nia lingvo kaj gramatiko verkis kaj afable disponigis por legantoj de nia revuo monde konata E-verkisto kaj poeto Baldur Ragnarsson. Legu aŭ kantu ilin laŭplaĉe!

Kanto pri nia gramatiko

Kanton pri la gramatiko
mi prezentas kun esper',
ke ĝi servu sen kompliko,
eble ankaŭ por parker'.
Teni sin sur Fundamento
ĉiam estas nepra dev',
daŭre gvidu nin la sento
de plenum' de nia rev'.

Jen unue la regulo
pri la artikolo la,
ĝi ne restu en nebulo,
sed uziĝu klare ja,
kiam ligas sin signifo
al specifa fenomen',
au al entoj sen modifo,
kiujn tenas firma pren'.

Vortoklasojn ni difinas
per vokaloj de sonor',
substantivojn legitimas
o-finaĵo de marmor',
adjektivojn same signas
sen indulg' finaĵo -a,
tiel tiaj vortoj dignas,
vivu ili - kaj hura'!

Verboj laŭdon ja meritas
pro finaĵoj -as, -is, -os,
malkonfuze ili spitas
ĉian tiron al ĥaos',
laŭ regule funkciantaj
ili marŝas sur la lang',
netaj, ĉiam elegantaj,
de la lingvo pura sang'.

La adverbojn ja facilas
formi per finaĵo -e,
tial nia lingvo brilas
kiel font' de vorta kre',
jen ekzemploj de mirindo:
ore suno levas sin,
plore palpas plu la blindo,
glore venku vorta vin'!

Tial kantu plenapulme
ni pri lingva, klara pur',
ni ĝin studu tondro-fulme
aŭ senhaste, kun plezur';
vartu ni la Fundamenton,
gramatikon de geni',
montru kreskan kompetenton
pri la lingva harmoni'.

Lastan strofon koroj ĥore
kantu per kuniga fort',
ĝoje, vigle, bonhumore,
ĉar nin benas bona sort':
ke ni vivas en epoko,
kiam viglas Esperant',
restu firma kiel roko
lingvo de ĉi tiu kant'.

Vigla kanto esperantista

Lingvo de la mondo ja
estas Esperanto.
Vortoj sonas dis kaj tra
de kvalit' kaj kvanto.
Sonas bele vokalar'
kaj la konsonantoj,
vice brilas sen kompar'
lingvaj diamantoj!

Esperanto, Esperanto, Esperanto,
Esperanto!

Tuj vekigu gefratar'
kaj orelojn klinu
al la lingvo de l' homar',
vivu ĝia klar'!



Voroncova Svrtlana [Kurgan, Rusio]

Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



de *Pierre Despoges*, franca humoristo tradukita de **Ginette Martin**
[Sauxures/Moselotte, Francio]

Difinoj

bankisto

persono, kiu konsentus alprunti monon al vi, kondiĉe ke vi alportus pruvon, ke vi ne bezonas ĝin.

aŭ : helpema homo, kiu alpruntas al vi pluv-ombrelon kiam sunas, kaj petas redoni ĝin kiam komencas pluvi.

kapitalisto

persono kiu veturas en klimatizita veturilo, de sia klimatizita oficejo al sia klimatizita klubo por ĝui vapor-banon.

pulovero

vesto, kiun infano devas surmeti, kiam la patrino malvarmas.

konsultisto

dirita pri tiu, kiu konsultas sian brak-horloĝon, diras al vi la horon, kaj pagigas la servon.

danco


vertikala nesatiĝo por horizontala deziro .

edziĝo

unio, kiu ebligas al du personoj elteni la problemojn, kiujn ili ne spertintus, se ili restintus fraŭloj .

aŭtobuso

veturilo, kiu ruliĝas du foje pli rapide kiam oni kuras post ĝi ol kiam oni estas en ĝi.



dentisto

magiisto, kiu metas en vian buŝon parton de tio, kion li reprenis el viaj poŝoj.

pesimismulo

optimismulo, kiu havas sperton.

progreso

doktrino, kiu konsistas en komplikado de tio, kio estas simpla.

vek-horloĝo

ilo inventita por vekti homojn, kiuj ne havas junajn infanojn.

sekreto

informo, kiun oni komunikas al po unu persono.

snobismo

aĉeto de ne-ŝatataj objektoj, kun mono kiun oni ne posedas, por impresi homojn kiujn oni ne ŝatas.

sinonimo

vorto skribenda anstataŭ tiu, pri kies ortografio oni dubas.

teamo-laboro

eblo ŝargi la kulpojn al la aliuloj.

stelulino

persono, kiu laboregas dum tuta vivo por esti konata, kaj kiu poste surmetas nigrajn okul-vitrojn por ne esti rekonata.



Trofimov Aleksej, [Omsk, Rusio]

Laslo Tabi,
Esperantigis Auderskaja Tatjana [Odeso, Ukrainio]

Pri konkluda raporto

- Ĉu vi tion serioze diras?
— Tute serioze!
— Do, vi aŭskultis nian karan estron, kaj ne komprenis pri kio temas?
— Bedaŭrinde, ne. Sed mi petas, al neniuj rakonti pri tio. Mi al vi konfesas nur pro tio, ke vi estas mia malnova amiko.
— Atendu, atendu. Ĉu vi certas, ke vi nenion komprenis?
— Nu, almenaŭ ne la tuton. Apartaj lokoj estis klaraj, sed la plenan bildon mi tute ne kaptis.
— Eble, vi neatente aŭskultis? Ĉu najbaroj ne malhelpis?
— Ne, ili silentis same kiel mi.
— Ĉu vi ne demandis ilin, ĉu ili komprenis?
— Nu certe ne, ĉar tiam ili komprenus, ke mi mem nenion komprenis.
— Hm. Al mi ŝajnas, vi devas tuj viziti kuraciston.
— Kian?
— La psikiatron. Kaj ne ĝenu, tio tute ne estas honto. La kuracista kontrolo ĉiam utilas por sano. Interalie, nun oni povas distingi la plej fruan gradon de sklerozo.
— Jes, jes. Ĉu vi ĵuras silenti pri tio, kion mi tuj al vi diros?
— Nu?
— Mi jam vizitis psikiatron.
— Bravo! Mi ĉiam konsideris vin saĝa. Nu, kaj kion li diris?
— Li atenteghe observis min kaj anoncis, ke troviĝas neniuj organikaj ŝanĝoj en la cerbo.
— Sed pardonu, degeneratoj ne devas nepre havi organikajn ŝanĝojn en la cerbo! Sur via loko mi, por esti trankvila, vizitus psikologon.
— Al neniuj tion rakontu, sed mi vizitis ankaŭ psikologon, tre alte pagatan.
— Bonege! Nu kaj kio?
— Ni konversaciis 2 horojn. Fine li diris al mi, ke mi estas absolute normala.
— Ĉu tiam vi trankviliĝis?
— Nu jes. Kion alian mi faru? Krom tio, por mi estis tre agrable ekscii, ke mia menso estas sana. Kvankam tio kostis por mi 500 Eŭrojn, mi ne bedaŭras!
— Certe ne! Vi tute pravas! Jen, tenu!
— Kion vi faras? Pro kio vi donas al mi 250 Eŭrojn?
— Ĉar nun ankaŭ mi trankviliĝis. Kaj kiel deca homo, mi volas dividi kun vi elspezojn. Vidu, ankaŭ mi nenion komprenis en tiu raporto.

* * *

Ŝercaj dialogoj

Kolektis kaj esperantigis
Ŝilov Aleksandr [Neftekamsk, Rusio]

- Filo-lernenejano petas la patron helpi en hejma tasko:
— Kiel korekte skribi "Vintre en vendejoj oni vendas "multe da paltoj" aŭ "multajn paltojn"?
— Skribu vi prefere pri printempo, - respondas la patro.

*

- Instruisto de pentroarto al la lernanto:
— Kial vi nenion desegnis?
— Mi desegnis bovinon, kiu paŝtas sur herbejo!"
— Do, kie estas la herbo?
— La bovino formangis ĝin.
— Kaj kie estas la bovino?
— Ĉu vi pensas ke la bovino restus, kiam la herbo forestas?

*

- Du papagoj sidis en kaĝo. Diris la unua al la dua:
— "Pffff, estas varmege!

La dua:


- Ĉu mi malfermu por vi la kaĝon?"

*

- Abraham, oni diras ke ĉe vi naskiĝis infano?
— Jes.
— Ĉu knabo aŭ knabino?
— Kompreneble!

*

- Mia naskiĝdato estas la 1-an de aprilo, sed mi neniam festas ĝin.
— Kial?
— Al mi neniuj kredas!



Kornjuĥina Anna [Barnaul, Rusio]

Via cerbo plijuniĝos



Boris Kolker: Vojaĝo en Esperanto-lando: Perfekta kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Tria eldono reviziita, kun indekso de nomoj, riĉe ilustrita. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2005. 280 paĝoj. ISBN 92 9017 088 3.

Catherine Boen [Francio]

La unua impresio, kiun oni havas kiam oni aĉetas la trian eldonon de la libro "Vojaĝo en Esperanto-lando", estas, ke temas pri moderna alloga lernolibro. Krome, oni povas legi, relegi ĝin, ĉiam kunporti ĝin - ĝi ne estas facile difektebla, kaj tio gravas, precipe por lernolibro (mia libro, uzita, uzata kaj uzota, ankoraŭ estas belaspekta). Oni tuj emas malfermi ĝin.

La libro estas uzbla diversmaniere. Mi konatiĝis kun ĝi pere de esperantisto, kiu ĝin kunportis dum biciklovojaĝo kaj ĉiutage plurfoje legis unu fragmenton, elektante tute hazarde. Li certe multe ĝuis siajn du samtempajn "vojaĝojn". Zorge legante la libron, oni konatiĝas kun elstaraj Esperantaj verkistoj el diversaj mondregionoj, kaj verŝajne emos legi kelkajn el la prezentitaj verkoj.

Pli laborema esperantisto decidis fari la ekzercaron. Multaj el la ekzercoj taŭgas por enkluba laboro aŭ por diskutgrupoj. Aliajn oni preferas faros unuope. Tiam oni bezonas spertan esperantiston, kiu povos kontroli la taskojn, sed alia ebleco estas aliĝi la Klubon de Vojaĝantoj kaj profiti la gvidadon de Boris Kolker, la aŭtoro de la libro. La "vojaĝo" certe estas interese, sed, kompreneble, oni bezonas iom da volo. Ni ĉiuj ja scias, ke la plej interesaj legadoj, studobjektoj, aŭ eĉ marŝadoj, ferioj... neniam estas la plej facilaj.

Je la fino de la vojaĝo, se oni presis la korektitajn lecionojn, oni havos sufiĉe dikajn dosieron, kaj se oni relegas la proprajn taskojn,

faritajn antaŭ kelkaj monatoj (du jaroj malfare!), la progresoj evidentiĝas.

Miaopinie, la vojaĝo ne finiĝu per tajpo de la lasta punkto! La dua ondo estus fruktodona: oni relegu la tekstojn, memoriĝu al si forgesitajn vortojn aŭ faktojn, relegu proprajn verkaĵojn, ekkonsciu pri plej oftaj eraroj, samtempe kiel eble plej ofte legante la tutan verkon, el kiu la fragmento estas elprenita. Post la fino de tiu laboro, la libro estos tre utila, kiam oni bezonos informojn pri verkistoj aŭ aliaj konataj figuroj de Esperantujo, ĉar ĝi estas kiel enciklopedieto pri Esperanto. Tiucele, la indekso de nomoj estas tre bona aldono al la tria eldono.

Se vi ne tro ŝatas verki, neniam tion ŝatis, aŭ nenion verkis ekde pluraj jardekoj, vi sendube akiros interesajn spertojn. Versajne, vi pli kaj pli facile verkos, la ideoj pli facile aperos, eble via cerbo plijuniĝos! Vi malkovros grandan ĝojon: kiam post longa tempo antaŭ blanka folio aŭ netuŝita ekrana paĝo ideo subite ekĝermos aŭ anekdoto trovos propran vivon, vi komprenas, ke ne necesas, ke oni estu elstara verkisto por vere ĝui verkadon. La kreaĵoj de la libro, kvankam ne ĉiam facilaj, estas fonto de granda plezuro. Laŭ mi, estas bona ideo fari ĉiujn, ne rezigni pri iu ajn ekzerco, humile akcepti, ke la rezulto ne ĉiam estas bona, sed almenaŭ fari sian eblon.

Estas ankaŭ tre interese, ke, plenumante la lecionojn, oni verkas pri ege diversaj temoj: simplaj aferoj de la vivo kiel ferioj, amo, vojaĝoj..., verkado de poemeto, komparo inter diversaj tradukoj de versaĵoj, kaj kompreneble pri Esperanto: ĝia kreado, ĝia utilo, ĝia historio, ĝia disvastiĝo, ĝia interna ideo, ĝia komunumo...

Sur la dorso de la kovrilo la aŭtoro invitas vin al komuna vojaĝo en Esperanto-lando. Ne hezitu, eniru la aŭtobuson; la ĉiĉerono estas bonega, kaj la lando nepre vizitinda!

Prezentita sur la paĝo kontribuado de Catherine Boen konvenas samtempe por du rubrikaj de nia revuo: por la novlanĉita ĉi jare rubriko "Impreso", ĉar transdonas impreson de Catherine Boen de la trailegita libro "Vojaĝo en Esperanto-lando" kaj por la rubriko "La praktiko," ĉar Catherine donas bonajn konsilojn pri tio, kiel plej fruktodone eblas uzi la libron por plibonigi sian lingvoposedon.

EN NIA MONDO

(Valso de vojaĝantoj)

Teksto de Nina Cvileneva
Muziko de Mikaelo Povorin

En universa stelara bukedo,
Ĉe flava stel' rotacias planedo:
Mondo de amo, sufer' kaj pasio
le ĉe rando de la Galaksio.

En ĉiu urbo aŭ eta vilaĝo,
Loko sufiĉas por stulto kaj saĝo,
Mildo, kruelo, fidel' kaj perfido,
Tage kaj nokte lamentoj kaj rido.

REFRENO:

En nia mondo tempesto ne ĉesas,
Sed ora suno nin ĉiujn karesas:
Aŭdu Esperon en brua tumulto,
Estas la lingvo ne ĉio, sed multo!

Sonas sur Ter' diverslingva parolo,
Sed ĉie vivas espero kaj volo.
Hom' estas homo en land' kiu ajna,
Malsimilec' nia estas nur ŝajna.

Flugu, do, nia saluta kanteto
Per venta blovo, radi', interreto,
Trovu amikon proksime kaj fore,
Kaj ni komprenos lin cerbe kaj kore.

REFRENO:

En nia mondo tempesto ne ĉesas,
Sed ora suno nin ĉiujn karesas:
Aŭdu Esperon en brua tumulto,
Estas la lingvo ne ĉio, sed multo!

La kanto aperis en la tria reviziita eldono de la libro de Boris Kolker "Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfekta kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo" kaj estis trifoje prezentita dum la 90-a UK en Vilno. Aŭskultu: <http://htliu.nease.net/vrec.htm>

Konkurso "Enigmoj – 2006"


Ek de tiu ĉi jaro ni lanĉas konkurson por enigmoj. Ĉiu enigmo estos poentigita, kaj tiu, kiu sendos al ni ĝustan respondon, gajnos tiun ĉi kvanton de poentoj. La redakcio regule publikigos la resumojn kaj familinomojn de ĉiuj dezirantoj partopreni, kaj komence de 2007 anoncos gajnontojn.

Tiu, kiu kolektos plej multe da poentoj, tiu gajnos la unuan premion – senpagan abonon de "Komencanto" por 2007. La dua premio – unika linro de poemoj de Nikolaj Hohlov, kaj la tria premio – honora diplomo kaj niaj gratuloj.

Viktor Alikin [Permj, Rusio]

krucvortenigmo – 10 poentoj

Diagonaloj



De supre dekstren:

1. Grupo de ludantoj en sporta konkurso. 2. Unu el kvar specoj de ludkartoj. 3. Fruktado de kverko. 4. Kemia elemento, kiu enestas en rustinuma ŝtalo. 5. Negranda kaverno. 6. Speco de urba trafiko. 7. Alfabeto. 8. Speco de brando. 9. Maldika kuko, flano. 10. ... validas tuj ovo, ol poste bovo. 12. Mezur-unuo de elektra rezistanco.

De supre maldekstren:

2. Trinkajo. 3. Mezur-unuo de pezo. 4. Fiksilo por konekto. 5. Titolo de nobelo. 6. Seĝo de reĝo. 7. Delikata, agrablaodoro. 8. Estro de monaĥejo. 9. Fluoro, kloro, jodo. 10. "Ruĝa..." en Moskvo. 11. Per tio oni riparas vestojn... 13. Malviro.

Solvoj de la enigmoj "Komencanto"-2005, №№ 5,6

№ 5 Kio estas sur la bildo? Blanka kato sur neĝo
Proverbo: Kiam kato promenas, la musoj festenas

o (13)	r (12)	k (1)	i (2)
m (14)	p (11)	m (4)	a (3)
e (15)	o (10)	e (5)	k (6)
n (16)	o (9)	t (8)	a (7)
a (17)	s (18)	o (19)	l (20)
o (21)	j (27)	o (26)	a (21)
f (23)	e (30)	s (25)	o (22)
t (32)	s (31)	u (24)	m (23)
e (33)	n (34)	a (35)	s (36)

№ 6 Novjaraj donacoj

al:
Petruška – harmonikon,
Leporeto – karoton
Ŝraŭbmajstro – ŝraubilon
Hundeto – oston
Pinokkio – ora ŝlosilon

Ĉe Novjara festotablo:

Jelena prenis oranĝojn, Viktoro-pomojn, Andreo - pirojn.

Kio estas superflua en la vico?

En ĉiu kvaropo tri signifoj estas ligitaj inter si per iu logika ligo, sed unu elfalas el logika skemo. Via tasko estas trovi tiun signifon kaj klarigi, kial ĝi estas superflua.

Por ĉiu korekta respondo kalkuliĝas po 1 poento. Maksimume vi povas gajni 10 poentojn.

filino
destino
fratino
virino
✦
vetero
rivero
vespero
fajrero
✦
renkonti
respondi
rekomendi
rememori
✦
elefanto
giganto
galanto
esperanto
✦
1913
1914
1915
1916
✦
malica
malakito
malversacio
malkontento
✦
A / B / C / Ĉ
✦
Kopenhavn
Sofio
Denhaag
Hamburgo
✦
kukumo
tomato
kukurbo
melono
✦
kvarto
kvarco
kvartalo
kvardeko

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 41-jara konstruisto. Mi serĉas seriozajn korespondamikojn el la tuta mondo. Nepre respondos.

Belousov Igorj

74 - 13
Engels - 1
Saratovskaja obl, 413101

Rusio

Mi estas 53 jara virino, komencantino, instruistino de la angla lingvo. Int.: koni diversajn kulturojn.

Victoria Benitez Guerrero
Meksikurbo,

Meksiko

vickyviva@yahoo.com.mx

23 gestudentoj ~ 20 jaraj, komencantoj, volas korespondi kun universitataj studentoj.

Josef Vojacek, la instruisto
Pedagogia fakultato de Universitato Masaryk, Brno,

Ĉeĥio

vojacek_j@jumbo.ped.muni.cz

Mi estas 52-jara instruisto. Plaĉas al mi havi amikojn el la tuta mondo. Int.: filozofio, psikologio, nudismo.

Arce Rene

Cordoba

Argentino

arsere2002@yahoo.com.ar

Mi estas progresanta esperantisto. Mi deziras korespondi kun geesperantistoj el la tuta mondo.

Bes Salazar Guillermo

calle 2 74 1/2 entre gasometro y 9. mariana de la torre, ,
Santiago de Cuba, 90200

Kubo

guillermo@cies.ciges.inf.cu

Mi estas komencantino, instruistino, intereso - legado, muziko.

Pender Jennifer

55 Router Street,
Toowoomba,
Qld. 4350

Aŭstralio

pender@usq.edu.au

Ge-onkloj

En Britio estas kelkaj homoj kiuj pretas esti Ge-onkloj kaj skribi al infanoj, kiuj estas komencantoj. La infanoj devas esti malpli ol 16-jaraj. Interesitoj skribu al: s-ro *Eric Walker*, Nacton, Ipswich, IP10 0LA,

Britio

ericwalker@gn.apc.org Tel: 01473 717088.

Mi estas farmaciisto, komencanta esperantisto, mi deziras korespondadi paperpoŝte kun ĉiuj landoj kaj pri ĉiuj temoj. Int: landoj, kulturoj. Nepre respondos.

Bidoni Hilda

Clemente Villada 1392 -
B° Pueyrredón
Córdoba C.P. 5012

Argentino


Mi estas studento de la dua jaro pri angla literaturo. Int.: multaj lingvoj, infana literaturo, fabeloj.

Amirixavari Farmehr

post box 14185-566
Tehrano

Irano

faraspb4@yahoo.com



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

39-a ILEI-Konferenco

La 39-a ILEI-Konferenco okazos de la 25-a ĝis la 29-a de julio 2006 en Parma kaj estas proponata kiel unu el la antaŭkongresaj eblecoj. Temo de la konferenco: Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj.

La konferenco sesios en la Instituto Salesiano San Benedetto. Estas diversnivelaĵoj tranokteblecoj en la konferenco mem kaj en ties ĉirkaŭaĵo. La prezoj varias inter EUR 21,00 kaj EUR 75,00 (en tendo aŭ ruldomo 6,00 EUR, en amasloĝejo 3,00 EUR kaj memzorgado).

Aliĝkotizo varias inter 15,00 EUR kaj 70,00 EUR depende de la kategorio kaj loĝlando de la aliĝanto.

Por mendoj atingantaj nin post la 1-a de majo 2006 oni devas aldone pagi EUR 40,00. Post la 1-a de junio 2006 ni ne plu povos por vi mendi tranoktejon.

Kadre de la konferenco oni traktos temojn kiel ekzemple: lingvaj rajtoj en la lernejoj, edukmodeloj en pluretnaj socioj, modeloj kaj ekzemploj de interkultura edukado, kvalitaj lingvoinstruistoj por kvalita lingvolernado, instruado de lingvoj kiel formo de sociigo, esperanto en lernejoj kaj interkultura komunikado. Okazos scienca simpozio kune kun universitataj ne-esperantistoj, lingva festivalo kaj, interalie, sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA. Oni planas komunan vojaĝon al UK post la konferenco. Informoj pri la konferenco kaj aliĝilo estas haveblaj en hejmpaĝo de ILEI www.ilei.info kaj ĉe ILEI-estrarano pri konferencoj

Aida Cizikalte, Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, LITOVIO, aidute@mail.lt

Viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!
komencanto@r66.ru

